Joseph Düpjohann,

# Ne antaŭen ĉiam hastu

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ne antaŭen ĉiam hastu,
trankviliĝu iom pli!
Haltu foje por ekvidi
la mizeron ĉirkaŭ vi!

Ne antaŭen ĉiam hastu,
turnu al la homoj vin!
Se ĉe l' voj' postrestas iu,
prenu ĉe la mano lin!

Ne antaŭen ĉiam hastu!
foje turnu vin al la
malfortulo, faru bonon,
via fort' ne daŭros ja!

Ne antaŭen ĉiam hastu!
Se malĝojas iu, vi
turnu vin ne for, ridete
alrigardu tiun ĉi!

Ne antaŭen ĉiam hastu!
Vi ne pensu sur la Ter'
nur pri vi kaj farto via!
Estas tiom da mizer'!

Ne antaŭen ĉiam hastu!
Vi disdonu ĝojon por
aliuloj, ĝi revenos
poste al la propra kor'.

*Traduko de la Basgermana poemo "Niemm di Tiet" de* Joseph Düpjohann *(Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1930-10-18) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2003-04-18.*

*MR-418-1 / Arg-254-515 (2004-07-02 13:35:07)*

*Kun afabla permeso de l' aŭtoro, sinjoro Joseph Düpjohan (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio), prenita el la libro "Liäbensbeller" ("Vivobildoj"), kiu aperis en 1998 en la eldonejo E. Holterdorf, Ruggestr. 27 - 29, D-59302 Oelde, F. R. Germanio.*